




Boletín[★]

de la Federación Española de Esperanto



TEMPLO DE DIANA

MERIDO



Nº 303

NOVBRO-DECBRO 1991

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Centra Oficejo:

c/ Rodriguez de San Pedro, 13. 3º. p-7.
28015 MADRID
Tel: (91) 4-46-80-79

Prezidanto:

Antonio Alonso Núñez
Apartado 714
E-15780 SANTIAGO DE COMPOSTELA
Telefono kaj fakso: 981-59-80-05

Sekretario:

Manuel López Hernández
Apartado 369
41080 SEVILLA

Vicprezidanto:

Alberto Franco Ramirez

Vicsekretario:

Luis Gil Pérez

Estrarano pri kontado (kasisto):

José M^a Bernabeu Franco
Gral Primo de Rivera, 6
03360 CALLOSA DE SEGURA
Alicante

Konto:

Cta Ahorro n° 83100-272 de Hispana
Esperanto Federacio en Banco Español de
Credito en Callosa de Segura.

Libroservo de HEF:

Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID

Fundación Esperanto

Sekretario: Enrique Piquero
San Vicente de Paul, 1, 1º.
50001 ZARAGOZA

Junulara Sekcio (HEJS)

Prezidanto: Iñaki Gauna
Domingo Beltran, 42, 4º D.
01012 GASTEIZ-VITORIA

Ĉef-redaktoro de Boletín:

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 27-29, 9º C.
50002 ZARAGOZA

Redaktoroj kaj kunlaborantoj:

Salvador Gumà Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andres Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutierrez Aduriz

ENHAVO

Sur nia vojo	3
For la mizeron!	5
Barcelono 1992, Olimpiaj ludoj	5
Valencio 1993, Universala Kongreso	8
Venontjara kongresurbo, Merido	10
Divenludo	13
Salvador Gumà 90-jara	14
Leteroj el niaj legantoj	16
Recenza angulo	18
Deziras korespondi	19
Elvokante nian Lirikan Feston	20
Viglas nia movado	22
Poetoj de Al-Andalus	25
Esperantista bebo	27
Fundación Esperanto premiis la Centran Oficejon de HEF	29

Kovrilo: Templo de Diana en Merido

Nota: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

SUR NIA VOJO

Apenaŭ du jaroj jam forpasis de kiam ekfunkciis la nuna HEF-estraro, kiu metis antaŭ sin densan malfacilan taskon kiel agadprogramon, kies ĉefajn punktojn oni povas resumi jene:

- a) Starigi bonajn rilatojn kun la hispanaj institucioj por atingi, ke ili pagu la kulturajn servojn kiujn ni donas al la socio, nome, ke la institucioj financu nian aktivadon kiel servon al la socio.
- b) Funkciigi la projekton prezentitan de Prezidanto Alonso pri Preuniversitataj Somerkursoj en la Universitato de Santiago de Compostela.
- c) Plialtigi la beletran nivelon de "Boletín", riĉigi ĝian enhavon kaj tamen malaltigi ĝian koston.
- d) Apogi la kandidatecon proponitan de niaj valenciaj samideanoj por okazigo de UK-93a en Valencio.
- e) Pretigi priesperantan komunan projekton kun aliaj eŭropaj landoj.
- f) Modernigo de nia administrado per uzado de komputiloj, telefaksaparatoj kaj reto de servoj, kiuj ebligu interkomunikadon de la propra estraro inter si kaj kun ĉiu hispana esperantisto deziranta kunlabori en la ĉiutage pli ampleksa tasko de nia movado.

Kompreneble, ekzistas aliaj menciindaj punktoj pezantaj sur la ŝultroj de niaj estraranoj, sed tio farus longegan komenton, kies celo ne preterpasas nian deziron informi la HEF-anaron pri nia plej grava laboro, ĝuste kiam finiĝas la duono de nia mandato.

Pri punkto "a" ni devas diri, ke post la unuaj sukcesaj klopodoj de nia Prezidanto ĉe ŝtataj instancoj (200.000 pesetoj kiel subvencio kaj salajrata posteno en Universitato) ni nenion plian atingis ĝis nun. Tio, tute simple signifas, ke almenaŭ momente, la hispanaj esperantistoj devas daŭrigi sian aktivadon nur per propraj rimedoj kaj klopodoj.

Koncerne al punkto "b", ni havas pli bonajn perspektivojn: Nia Prezidanto publike prezentis la projekton pri Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto kadre de nia kongreso en La Laguna, kaj ankaŭ en la Universala kongreso (Bergen) kaj en la Konferenco de ILEI (Voss). En la tri kazoj, la projekto ricevis varman akcepton kaj promeson pri apogo de diversaj institucioj. La ĉefaj estas tiu de la Prezidanto de la Universitato de Hartford (Usono) pri sendo de profesoro por la Kursoj, kaj tiu de la Gesellschaft für Internationale Sprache (Societo por Internacia Lingvo, rilata al Hamburga Universitato) pri sendo de profesoro kaj propono de la jam ekzistantaj studkajeroj pri "Konjunkturpolitiko" kaj pri "Entrepenistaj

Strategioj kaj Ekstera Reklamo". Por la pleja sukceso de la nun entreprenataj aranĝoj, tre gravas ke similaj apogleteroj venu de kiel eble plej multaj institucioj kaj ankaŭ fakuloj el kiel eble plej multaj landoj. Ni tial petas niajn legantojn, ke ili bonvolu prezenti la projekton kaj la informilojn al institucioj kaj fakuloj, kaj klopodu sendigi apogleterojn al "Curso de Esperanto — Instituto de Idiomas"; Praza de Mazarelos, s/n° 15703-SANTIAGO DE COMPOSTELA. (Hispanio)

Pri punkto "c", rilate al "Boletín", oni povas informi niajn legantojn pri la atingo de atentinda malaltigo de la eldonkostoj. Ankaŭ konstateblas akurateco en ĝia apero, pliriĝigo de la enhavo kaj pli da paĝoj en ĉiu numero, sed la redakcio celas ankoraŭ aliajn plibonigojn en venontaj numeroj... Aspiroj ja ne mankas!

Pri la UK, punkto "d", oni povas jam anonci la oficialan inviton de UEA okazigi la Universalan Kongreson en Valencio por la jaro 93a. Unuaniman gratulon meritas samideano Augusto Casquero, kiu tiel brave batalis por tiu atingo.

Rilate al la pretigo de komuna priesperanta projekto por internacia kunagado, punkto "e", ĉe la Eŭropaj institucioj, la afero ja ne multe progresis, sed ni agnosku ke ĝi ne facilas...


Kaj fine pri la modernigo de la Administra aparato de HEF, absolute neprokrastebla, ni konfesu nian malkapablon ĝis nun atingi la necesan monon por akiri modernajn aparatojn per kiuj oni povas rapide kontakti parole aŭ

skribe, arkivi niajn beletrajn kaj lirikajn tradukojn ĝis la momento oportuna, prepari senriproĉan kontostaton, kaj komposti iom post iom nian bultenon, vortarojn aŭ eldonotajn librojn; resume, malvolvi nian aktivadon efike helpite de la nuna tekniko... Momente ni duonsolvastu tiujn mankojn uzante privatajn aparatojn. Laste, danke al iniciato de "Fundación Esperanto" kaj monkolleto, oni aĉetis komputilon, por ke nia Redaktoro redaktu la revuon. Jen la bona vojo!

Mankas al ni... ho jes! oni povus fari longan liston pri mankoj, sed ni preferas ne fari ĝin. Mi certigas al vi nur, karaj HEF-anoj, ke la estraro faros ĉion eblan por aktualigi nian Federacion en ĉiu fako kaj per propraj rimedoj. Samtempe ni invitas vin kunlabori por niaj komunaj aspiroj, ĉar sen via kunlaboro certe ni neniam sukcesos.

Dume, ni trairas nian vojon, kun la rigardo antaŭen kaj la espero en niaj koroj!

La Redakcio.



FOR LA MIZERON!

Boletín

mi amas vin

FUNDACIÓN ESPERANTO

Listo de lastaj kontribuantoj al la kvesto organizita de *Fundación Esperanto* cele al aĉetado de komputilo por la redaktado de *Boletín*. Dankon al ĉiuj.

Antonia Lapuerta	500 ptoj
D-ro Bielsa	2.500 ptoj
Antonio Marco Botella	1.000 ptoj
Luis Hernández García	1.000 ptoj
M ^a Rafaela Urueña Álvarez	1.000 ptoj
José González Suárez	1.000 ptoj
Grupo Fido kaj Espero (Valladolid)	10.000 ptoj
Teódulo Sánchez Pérez	2.000 ptoj
Juan Liceranzu	2.000 ptoj
Cesar de Mosteyrín	2.000 ptoj
Faustina Martínez	3.000 ptoj
Jozefo Sardá	4.000 ptoj
Rodolfo Canét Marín	5.000 ptoj
Emilio Folgado López	1.000 ptoj
J.C.R.S	5.000 ptoj
Anonima (25-9-91)	5.000 ptoj

TOTALO 95.000 ptoj

Celo preskaŭ plenumita!

Barcelona 1992 Olimpiaj Ludoj

La tempo flugas. Ŝajnas ke estis hieraŭ kiam la hispano A. Samaranch anoncis en Svisujo la aljuĝon de la Olimpiaj Ludoj al la urbo Barcelono. De tiu

dato, granda estas la entuziasmo en Hispanujo, kaj kompreneble multe pli en Barcelono. Post tiu memorinda tago en Laŭzano, komenciĝis la problemoj. Oni povas diri, ke aparte de la futballudejoj, ĉio restis farota. Nun, je unu jaro antaŭ la inaŭguro de la Olimpiaj Ludoj, verŝajne ĉio iras sur kontentiga vojo, kaj iom post iom la diversaj olimpiaj konstruaĵoj majeste sin prezentas al la scivolema publiko. Ne ĉio aperis rozkolora. La financa afero estis kaj estas la plej grava kaj malfacile solvebla problemo. Financistoj, bankoj, konstruaj entreprenoj kaj granda amaso da aliaj firmaoj apogis tiom ambician iniciaton. Sed evidentiĝis, ke tio ankoraŭ ne sufiĉas. La urbestro de Barcelono devis enŝuldiĝi je multaj milionoj da pesetoj. Pro politikaj kaŭzoj ne bone funkciis la financado de la "Generalitat", kvankam ŝajnas, ke lastatempe ekzistas iom pli da harmonio inter ambaŭ katalunaj institucioj. Malgraŭ ĉio ankaŭ devis interveni la hispana ŝtato aŭ centra registaro. Kiom kostos la Olimpiaj Ludoj? Kiom ni devos pagi per impostoj? Sendube al tiuj demandoj ekzakte neniu povas ion respondi.

Evidente, kiu eltiros la plej grandan profiton estas la urbo Barcelono. Fakte, kaj pro la konstruaĵoj kaŭzigitaj de la Olimpiaj Ludoj, la urbo videble transformiĝas. Aperas novaj avenuoj, oni konstruas novajn aŭtomobilajn vojojn. Restos por la urbo aliaj sportaj


konstruaĵoj kaj oni starigas novan reton da hoteloj. Ĉio en ĉi tiuj jaroj de labormanko donas iom da labora trankvileco en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Kio okazos post la jaro 1992a? Tiu demando jam cerbumigas ĉiun civitanon! Oni diras, ke post tiu magia jaro, Barcelono estos tute alia. Mi ĉiam demandas min, ĉu tiuj dekkvin tagoj sufiĉos por reakiri la tutan investitan monon? Kaj ĉu oni devas atendi tiujn internaciajn eventojn por plibonigi la urbon?

Ni esperu, ke ne okazos internacia konflikto, ĉar ĝi ruinigus la faman urbon Barcelono-92a, kaj la iluziojn de multaj hispanoj...

Alia grava temo estas, kio okazos en Barcelono dum tiuj du semajnoj? En kiu ajn dimanĉo kaj eĉ en laboraj tagoj la urbo estas plene de aŭtomobiloj. La placo Katalunujo kaj la tutmonde konata promenejo

"Ramblas" ĉiutage kaj precipe dimanĉe estas kvazaŭ homa "formikejo" kaj se venos tiuj miloj da alilandanoj, kio okazos en la Grafa Urbo? Ni ne devas nin trompi, Barcelono estas malgranda urbo kaj ĝiaj pitoreskaj centraj stratoj ne estas adekvataj por tia grandioza evento, kia estos la Olimpiaj Ludoj.

Nu, restas la sporta flanko. Kio okazos? Kion faros la hispanoj? Ĉu ni, kiel kutime atingos tiujn kontentigajn rezultatojn? Nun, estas jam la momento kiam ne plu validas ekskursoj. Ni havis sufiĉan tempon por trejni



niajn atletojn. Se mi ne eraras, la koncernaj hispanaj institucioj senrezerve apogas la trejnadon de niaj atletoj. Do, ĉio dependas de ni. Kion ni ne povas fari, tio estas kulpigi aliajn pri nia nekapableco. Mi konstante legas pri la malbona ŝanco aŭ pri tiu aŭ alia sinjoro, kiu malfavoris nin kaj aŭdas multajn aliajn kanzonojn kun simila muziko. Alvenis la horo de la vero. Tiu jaro 1992 estas la limo. Aŭ Hispanio havas atletojn aŭ ni ne rajtas nek meritas troviĝi inter la elito de la sporta mondo. Ne plu oni povas diri: nu, post kelkaj jaroj niaj geatletoj multe pliboniĝos. La vero estas, ke tiurilate la esperoj ne estas grandaj. Neniu optimisme atendas la jaron 1992an. Eble ni atingos kelkajn medalojn, pri kaj per kiuj ni multe fanfaronas. Ni esperu ke ĉar niaj atletoj troviĝas hejme ili havos pli grandajn eblecojn. En aŭgusto 1992a vi kaj mi jam havos la respondon.

Hodiaŭ tiuj sportaj ludoj, malgraŭ tio ke ilin oni anoncas kiel amatorajn, fakte jam estas profesiaj. Nuntempe la atleto devas dediĉi multajn horojn al la trejnado. Eĉ se ili ricevas salajron de labora posteno, estas evidente, ke la plej grandan parton de la tempo ili dediĉas por sin trejni. Do la vera senco de la amatora sporto, kies celo estas la kulturigo de la korpo post la ĉiutaga laboro, tute malaperis. Komprenoble al ĉiu spektanto plaĉas, ke la atletoj atingu novajn rekordojn, kaj kion diri pri la atletoj mem? Do, la superigo de la atletoj estas konstanta, kvankam nuntempe tiu superigo nur konsistas el sekundoj aŭ dekonuoj de

sekundo. Tamen iam ankaŭ la atletoj atingos sian limon, ĉu ne?

Mi ankaŭ deziras diri mian opinion pri la vetero. Mia sperto diras al mi, ke tiu dato julio-aŭgusto por okazigo de la Olimpiaj Ludoj estas la plej malfavora, kial? Nu, pro la varmo. En Barcelono dum somero la varmo konstante ŝvitigas la korpojn kaj tage kaj nokte la vestaĵoj algluiĝas al la karno. Eble oni devos sekvi la konsilon de la Barcelona urbestro, nome, li petis al la barcelonanoj, ke ili feriu dum tiu tempoperiodo de la Olimpiaj Ludoj.



Restas la temo pri Esperanto. La ĉeesto de diverslingva homamaso estas unika okazo. Ĝis nun, laŭ mia scio, nenion oni faris, aparte de perspektivoj, en kiuj aperas la vorto Esperanto. La Kataluna Esperanto-Asocio, faris nenion ĉar laŭ ili oni intencas hispanigi Katalunion. Aliaj esperantistoj pli moderaj, ĝis nun nenion faris kaj ne plu estas tempo por organizado de komitato, kiu povus sin okupi pri la esperantistoj alvenontaj al Barcelono okaze de la Olimpiaj Ludoj.

Luis Serrano Pérez

Valencio 1993 Universala Kongreso

Finfine!

Kion ni povas diri? Grandan emocion sentas ni en ĉi tiu historia momento de la Esperanta movado kaj universala, kaj hispana, kaj valencia.

Oni bezonis 105 jarojn, post la eldono de la unua gramatiko de nia Majstro, por ke Valencio havu la honoron ricevi la esperantistojn de la tuta mondo kaj fariĝu la monda ĉefurbo de nia movado.

Post la oficiala peto prezentita en Varsovio en la jaro 1987, kun la invito de la tiama urbestro de Valencio, Ricart Pérez Casado, kvar longaj jaroj pasis sen ricevi oficialan respondon de UEA. Sed finfine la "miraklo" okazis. Ene de la Solena Fermo de la UK en Bergeno la Ĝenerala Sekretario de UEA, Ian Jackson, oficiale proklamis Valencion kiel sidejon de la 78a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1993.

Ĉi tiu sukceso ŝuldiĝas ne nur al la streboj de la esperantistoj kaj de la oficialaj instancoj de Valencio, sed al la granda apogo, kiun la tuta Esperanta Movado de Hispanio donis en ĉiu momento kun granda espero, pacienco kaj iluzio.

Speciale mi volas danki la grandan apogon de nia kara Prezidanto de HEF, Antonio Alonso Nuñez, kiu tre kuraĝe defendis nian kandidatecon, en tre streĉa kaj delikata kunveno kun la Prezidanto de UEA, John Wells, kaj la Direktoro de la Centra Oficejo, Simo Milojević. Ni, kune kun kataluna samideano, prezentis al ili kvazaŭ "ultimaton" kaj je la fino de la kunveno, post klarigo de ĉiuj organizaj punktoj, finfine oni diskutis kaj aprobis en la kunveno de la estraro de UEA, kiu okazinta unu horon poste, ke Hispanio organizos tiun UK-on.

Ni devas danki ankaŭ la kuraĝan apogon de Luis Hernández, hispana komitatano, kaj María Rafaela Urueña, kiuj batalis dum la tuta kongreso por atingi ĉi tiun sukceson. Same ni dankas la fervoran apogon de ĉiu hispano kiu troviĝis en Bergeno, kaj ankaŭ de amaso da esperantistoj ne hispanaj kiuj ankaŭ apogis nin, kiel la Viceprezidanto de UEA, Roman Dobrzynski, la Prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, Julián Hernández, la pola komitatano Lech Kosieniak, la ĉefredaktoro de

"Heroldo", Ada Fighiera Sikorska, Ursula Gratapaglia, kaj centoj da esperantistoj kiuj ege deziris, ke ĉi tiu UK okazu en Hispanio.

Do, jen la momento. La tuta Esperanto-movado rigardas nin. Ĉu ni kapablos organizi Universalan Kongreson por ĉiam memorinda kiel mirinda travivaĵo? Ni estas certaj, ke jes. Kun la helpo kaj entuziasmo de ĉiuj, ni sukcesos kaj organizos kongreson efikan laŭ esperanta vidpunkto, amuzan por ĉiuj kaj sufiĉe malmultekostan por helpi la partoprenon de esperantistoj de la ĝis nun nomataj "nepagipovaj landoj", nome Orienta Eŭropo, Suda Ameriko, Azio kaj Afriko.

La laboro jam komenciĝis. Re prezentantoj de la LKK havis jam kunvenon ĉe la urbodomo kun la Vicurbestro, Vicente González Lizondo, kiu prezentos oficialan proponon al la Ĝenerala Asembleo, por ke la Valencia urbodomo sin deklaru oficiala protektanto kaj kunlaboranto de la UK; pruntu la Palacon de la Muziko kiel kongresejon, senpage (la normala kosto estas proksimume dek milionoj da pesetoj); sendu oficialan leteron al la Reĝo Juan Carlos kun la peto, ke li estu Honora Prezidanto de la UK; eldonu belan turisman broŝuron pri Valencio en Esperanto; aprobu, ke la Orkestro de Valencio ludu por la kongresanaro; ke la urbestro ĉeestu la Solenan Malfermon; ke oni faru Oficialan Akcepton ĉe la urbodomo al la kongresanoj, ktp.

Ankaŭ baldaŭ ni havos kunvenojn kun la Konsilanto pri Kulturo de "Ĝenerallat" (registaro de la aŭtonoma valencia lando), kun la skabeno pri Edukado, kun la Konsilanto pri Turismo, kun la Urbestro de Chesto, ktp.

Ni ankaŭ deziras mencii, ke de la 6a ĝis la 11a de Novembro ni havos la plezuron ricevi en Valencio la viziton de komisiono el Roterdamo por paroli kun ni, viziti la aŭtoritatojn kaj konstati, ĉu ni "funkcias" bone aŭ ne. Ni esperas, ke la Valencia esperantistaro gastigos ilin adekvate.

Do, jen ĉio ĝis nun. La afero jam marŝas. ANTAŬEN!

KOTIZ-TABELO

Membro-abonanto	2.000 ptoj
Emerito, junulo, senlaborulo	1.500 ptoj
Asocio aŭ Grupo	4.000 ptoj
Dumviva membro	50.000 ptoj
Eksterlanda abono al Boletfn	35 gldoj (aŭ ekvivalento)

VENONTJARA KONGRESURBO, MERIDO



Historia skizo pri la urbo.- Merido, fondita de Publio Carisio en la jaro 24a aK., kaj nomita de la romianoj Emerita Aŭgusta, estis la urbo plej loĝata de la romia Hispanio (laŭ Aŭsonio, la dekunua en la tuta imperio). Ĉefurbo de la tiama Luzitania, ĝin okupis poste visigotoj kaj araboj. El tiuj civilizacioj oni konservas ankoraŭ tre interesajn restaĵojn.

Pro sia strategia situo ĉe rivero Gvadiano kaj sur la fama Vojo de la Arĝento, Merido baldaŭ iĝis centro por komerco kaj komunikado kaj unu el la plej grandaj urboj de Iberio, al kiu, altirite de la intensa komercado venadis homoj de tre diversaj etnoj.

Merido ree prosperadis dum la 7a j.c., sub regado de la visigotoj. La araboj okupis ĝin en 713a, kaj ĝin rekonkeris en 1228 Alfonso la 9a, kiu ĝin konfidis al la Kavalira Ordeno de Santiago.

Post longa periodo de malgranda kresko, Merido reakiras nun sian iaman gravecon. En 1983a ĝi estis elektita ĉefurbo de la Aŭtonoma Komunumo Ekstrema-
duro, kadre de la nova hispanŝtata strukturo. Hodiaŭ ĝi nombras 54.000 loĝantojn kaj sin prezentas kiel dinamikan urbon, kiu fronte al estonto sukcesas harmonie akordigi sian historian kaj monumentan heredaĵon kun intensa kultura vivo kaj moderna evoluo.

Se vi partoprenas nian kongreson venontjare memoru ke vi devas nepre viziti:

Romia teatro.- Konstruita sur monteto en la jaro 15a-16a aK.. Ĝi estis donaco al la urbo fare de Agripa, bofilo de la imperiestro Aŭgusto. Tie elstaras la scenejo konstruita pli poste en la 2a j.c. pK. borderita de bela dukorpa korintika kolonaro verkita de helenaj artistoj. Aliaj du gravaj partoj estas la orkestro -duoncirkla spaco por la koruso kaj dancantoj- kaj la sidŝtuparo, provizanta lokon por 5.000

spektantoj. Tie okazas ĉiujare, dum monato Julio kaj parto de Aŭgusto, la Internaciaj Festivaloj de Klasika Teatro.

Amfiteatro.- Situenta apud la Teatro, ĝi estis inaŭgurita en la jaro 8a aK. Tie okazadis la tre ŝatataj bataloj de gladiatoroj, jen inter ili, jen kontraŭ sovaĝaj bestoj. Ĝia formo estas elipsoida, kun podio apartiganta la arenon disde la trivica sidŝtuparo, kie ekzistis spaco por ĉirkaŭ 15.000 spektantoj.

Romia cirko aŭ hipodromo.- La hipodromo estas longa paralelograma cirko, kie okazis ĉaraj kaj ĉevalaj vetkuroj. Podio staris inter la areno kaj la sidŝtuparo. Konstruita ekstere de la urbaj muregoj, ĝi estas la sola en Hispanio ankoraŭ konservanta komplete la platformon. Ĝi estis la tria el la monumentaj konstruaĵoj starigitaj en Merido por publikaj spektakloj, kiujn la romianoj tre ŝatis.

Amfiteatra domo.- Belega ekzemplero de palaco, konstruita dum la 3a j.c. pK. apud la Amfiteatro. Ĝi konsistas el kuirejo, ĉambroj dekoraciitaj per pentraĵoj kaj mozaikoj, portika korto kaj termobanejoj.

Domo de Mitreo.- Tiun ĉi sinjoran loĝejon oni konstruis apud sanktejo konsekrita al dio Mitra (eble troviĝanta sub la nuna taŭroludejo). Interne de la konstruaĵo ekzistas pluraj kortoj, termobanejoj kaj ĉambroj pentre kaj mozaike dekoraciitaj. Inter ĉi lastaj rimarkindas la fama Kosma Mozaiko, kies beleco kaj tema originaleco igas ĝin unu el la plej gravaj el la romia mondo.

Templo de Diana.- Tiu ĉi templo, dediĉita al la imperiestra kulto, estis konstruita en la 1-a jarcento pK. en la municipa forumo de la antikva kolonio. Ĝia bazamento estas ortangula, borderita de 30 kolonoj, kiuj en tiu epoko estis probable stukitaj. En la 16a j.c. oni transformis parton en palacon, kies strukturo parte postrestas en la restaŭro nun farata.

Arko de Trajano.- Arko de Trajano (Traĥano) apartenas al nombro de tiuj monumentoj, kiuj, pro sia imponeco, montras al ni la romian spiriton, kvazaŭ proklamante la eternan gloron de Emerita Aŭgusta. Tiu ĉi triumfa arko estis konstruita el granito, iam en la 1a jarcento pK., dividante la urbon en du ĉefajn areojn: Municipa Forumo (ĉirkaŭ Templo de Diana) kaj Provinca Forumo (proksime de la nuna "Nacia Restadejo"-Parador Nacional-).

Romiaj akvorezervejoj kaj akveduktoj.- Ili estis konstruitaj por provizado de akvo al la urbo. Inter la akvorezervejoj okulfapas tiu de Proserpina (artefarita lago kun baraĵo), situanta 5 km for de la urbo kaj uzata nuntempe kiel grava loko por malstreĉiĝo kaj distro, kaj tiu de Cornalvo, 15 km for en direkto al Madrido,

ĉirkaŭita de vasta arbaro el mediteraneaj kverkaj specoj, antaŭ nelonge oficiale kvalifikita kiel nacia naturparko.

Por transigo de la valo de rivero Albarregas estis konstruitaj du akveduktoj: tiu grandioza de Los Milagros (La Mirakloj), kies vastaj ruinoj ankoraŭ postrestas, kaj tiu de San Lázaro (Sankta Lazaro), kies postrestaĵoj estas tre malmultaj.

Ponto super rivero Gvadiano.- Konstruita el granito dum la Aŭgusta epoko, ĝi longas 792 m. Komence ĝi havis 81 arkojn, nuntempe nur 60. Pro sia monumenteco kaj longeco, ĝi estas la plej grava el la romia mondo, se oni esceptas la faman ponton super rivero Danubo. La nuna ponta strukturo originas el ties lastaj restaŭroj, faritaj dum la 17a kaj 19a jarcentoj.

Kolumbarioj.- Temas pri du panteonoj situantaj ekster la urbaj muregoj, apartenintaj al familioj Julia kaj Vokonia. Ili estas du gravaj ekzemploj pri la romia funebra arkitekturo. La interesaj pentraĵoj dekoraciantaj la tombon de la Vokonioj montras portretojn de la mortintoj.

Araba fortikaja alkazabo kaj monaĥejo de Santiago.- Apud la romia ponto, sur la digo de rivero Gvadiano, la araboj konstruis alkazabon en la epoko de Abd-al-Rahman la 2a (9a j.c.)

La citadelo konservas en sia interno gravajn arkitekturajn restaĵojn el la romia, visigota kaj araba civilizacioj, inter kiuj elstaras la araba cisterno ornamita per interesaj visigotaj pilastroj, same restaĵoj de romiepoka nobela loĝejo.

Nacia muzeo de romia arto.- Tiu ĉi moderna konstruaĵo, desegnita de arkitekto Rafael Moneo, prezentas originalan kombinon de teknikaj estetikaj konceptoj de la romia arkitekturo kun tiuj de la nuntempa arto.

Tie estas montrataj skulptaĵoj, pentraĵoj, mozaikoj, ceramikaĵoj, vitraĵoj, kaj ankaŭ vastaj kolektoj de iloj por la ĉiutaga vivo, tiamaniere ke la ensemblo vere atestas pri la kategorio de tiu ĉi muzeo kaj pri la glora pasinteco de urbo Merido.

La O.K.K.

La majstroverko Don Quijote

Edonita de FUNDACION ESPERANTO
kostos 4.000 ptojn ekde 1-1-1992.


Atentu!

♣ DIVENLUDO

PRI ESPERANTAJ EVENTOJ EN FAMA HISPANA URBO

Ĉu vi bone konas la historion de Esperanto? Provu respondi la sekvajn dek demandojn, kiu rilatas al pasintaj agadoj de esperantistoj en la sama bone konata urbo. Ĉu vi sukcesos identigi ĝin surbaze de la demandoj kaj respondoj?

- 1.- "Dicionario Esperanto-Español de Rafces" estis eldonita en 1903 ĉe la presejo Gimeno. Kiu estis la aŭtoro?
- 2.- En Oktobro 1903 aperis la unua numero de monata gazeto, kies fondinto kaj ĉefredaktoro estis Augusto Jiménez Loira. Kiel nomiĝas tiu periodaĵo?
- 3.- Ĉe presejo "Moderna" estis publikigita en 1905 parto de fama hispana beletraĵo, esperantigita de Carlo Bourlet, Vicente Inglada kaj Law. Kiel nomiĝas tiu 22-paĝa libro?
- 4.- En la urbo, kie okazis la Postkongreso de la UK de 1909, malriĉa virino estis operaciita pri katarakto en la kliniko de d-ro Aguilar Blanch. Kiu estis la esperantista oftalmologo, kiu faris la operacion?
- 5.- Mortis en la jaro 1927 viro, kiu estis la unua presisto en Hispanio, kiu solvis kontentige la problemon de presado de la Esperanta alfabeto. Kiu li estis?
- 6.- De post la unua de januaro 1934 la adreso "strato Sangre, 9-11" havis gravan signifon por membroj de la Hispana Esperantista Konfederacio. Kial?
- 7.- Ankaŭ en 1934 okazis en tiu ĉi urbo la 14a Internacia Kongreso de fama laborista organizaĵo. Kiel ĝi nomiĝas?
- 8.- En la urba Kuracista Instituto, la 5an de junio 1948, tiea kuracisto faris la unuan publikan prelegon en Esperanto post la intercivitana milito pri la temo "Esperanto kiel helpingvo por kuracistaj studoj" Kiu li estis?



- 9.- En 1949 viro, kiu uzis la pseŭdonimon "La Legema Koboldeto", fariĝis la unua ĉefredaktoro de "Boletfn". Kiel li nomigās?
- 10.- En 1964, dum la oficiala bankedo de la 25a Hispana Kongreso en la restoracio "Dos Puertas", oni trinkis faman ŝaŭman vinon kun Esperanta nomo. Kio estis la nomo de tiu vino?

Bernard Golden

Noto de la Redakcio.-

Laŭ iniciato de nia kunlaboranto Bernard Golden, ni prezentas al niaj legantoj la ĉi-supran Divenludon, kies celo estas nur stimuli ilin koni la historion de la Hispana Esperanto-Movado.

"Fundación Esperanto", kohere kun sia celo instrua kaj eduka, donacos ekzempleron de la fama verko "La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha", de Miguel de Cervantes Saavedra, trad. de Fernando de Diego, 813 pag., al tiu konkursanto sendonta trafan respondon al ĉiu el tiuj dek demandoj, ĝis la 30a de januaro 1992.

Okaze de pluraj pozitivaj respondantoj oni lotumos la tutvaloran libron inter ili. Bonvolu adresi viajn leterojn kun la respondoj al "Fundación Esperanto". C/San Vicente de Paŭl, 1.-E. 50001-ZARAGOZA.

SALVADOR GUMÀ 90-JARA

Antaŭ kelkaj tagoj, ĝuste la 30an de Septembro, Salvador Gumà i Clavell fariĝis 90-jara. Dojeno de la redaktora nuna skipo de "Boletfn", inteligenta kaj kompetenta esperantisto, lerta verkinto/anto de interesaj artikoloj, rakontoj, recenzoj kaj poemoj, li estas en nia lando nun unu el la plej veteranaj kaj kapablaj esperantistoj, kies brilan agadon li diskrete kaŝas sub sia natura kaj laŭdinda modesteco.

Samideano Gumà esperantistiĝis en 1917 kaj baldaŭ li distingiĝis pro sia flua kaj senerara parolo. Li gvidis kursojn en Barcelono, Alcover kaj Reus; ankaŭ en Francio: Parizo kaj Sollies-Pont. Preleginto/anto en la kataluna kaj esperanta, bona verkisto, li estis plurfoje premiita en literaturaj konkursoj, inter aliaj de UEA, Comella-Bassols, Oomoto, k.a. En la jaro 1926a, k-do Lanti, fondinto de SAT, proponis al li la redaktadon de "Sennaciulo", kaj dum jaroj li kunredaktis la revuon "Horizonto" kiam ĝi estis eldonata en Zaragozo.

Mi konatiĝis kun li dum la unua kongreso post la intercivitana hispana milito, 12a HEF-kongreso okazinta en Terrassa en 1951a- kaj mi estis tuj kaptita de lia talento, modesteco kaj interesa konversacio. De tiuj tagoj mi ĉiam konsideras lin

kiel bonan kaj sinceran amikon. Ankaŭ mi ne forgesis tiun lian spritan viklecon, lian facilan improvizadon de humuraj kantaĵoj en Esperanto, kiujn ni (miaj esperantistaj samurbanoj kaj mi mem) ĝoje kunkantis dum la ekskursoj de tiu historia kaj memorinda kongreso. Jen kelkaj el tiuj versaĵoj, vera kaprompilo la rimigo kaj ritmigo de tiuj tiklaj versoj!:



Se vi celas geedziĝon
observadu la fraŭlinojn,
ĉu en manoj havas truojn
kaj akrajn ungojn je la fingroj.

Varman lokon serĉas katoj,
molan pajlon volas hundoj,
kiel kapkusenon volas
mi, vian mole varman bruston.

El la ripo de Adamo
kreis Dio la virinon,
por ke ĉiu viro rongu
ostegon dum la tuta vivo. Ktp.Ktp.

Samideano Salvador Gumà estas membro de la Juĝkomisiono de la Literaturaj Konkursoj de Internaciaj Floraj Ludoj kaj de "Fundación Esperanto", kaj de post la UK en Madrido (1968-a) li korektas la tekstojn de "Boletín" kaj de multaj aliaj publikigaĵoj.

Kun emocio kaj ĝojo, ni, viaj amikoj kaj multenombraj esperantistoj gratulas vin, amiko Salvador, kaj deziras al vi la plej bonan okaze de la 90-a datreveno de via naskiĝo!

Ankaŭ viaj kunredaktoraĵoj, la Prezidanto de HEF, ĉiuj hispanaj esperantistoj, volas danki viajn servojn al la Movado kaj prezenti al vi aman mesaĝon...

Feliĉon kaj longan vivon, amiko Salvador!

Antonio Marco Botella.

HEF 91-446-80-79
Por aŭskulti viajn sugestojn
kaj respondi viajn demandojn



Leteroj el niaj legantoj

KOMENTOJ AL ARTIKOLO DE GOLDEN

Ricevinte "Boletín" kaj leginte la artikolon de S-ro Bernard Golden "Nekonsevenca esperantigo de hispanlingvaj nomoj" mi devas elparoli mian elkoran dankon pro lia trafa opinio. Mi mem antaŭ jaroj parolis al distrikta renkontiĝo esperantista mian opinion pri tiu problemo. Eble mi povas iomete kontribui al la opinio de samideano Golden. Jen mia tiama parolado:

"Karaj gesamideanoj, temas pri "Skrubmaniero de personaj kaj lokaj nomoj". Mi provos klarigi, interpreti kelkajn opiniojn de spertaj lingvamikoj pri tiu ĉi eksterordinara delikata, malfacile kontentigebla problemo.

Estas kaj estis jam multaj lingvo-spertuloj, okupiĝintaj pri tiu ĉi problemo, sed neniu el ili sukcesis tute solvi ĝin. Konsiderante la multnombrojn da personaj kaj urbaj nomoj en la tuta mondo, kaj konsiderante la milojn da diversaj lingvoj, la diverseco de la prononcado, akcentado, oni devas tiri el tio konkludojn tiamaniere, ke oni skribu la propran nomon plej bone nur en ĝia gepatra lingvo kaj eble en krampoj, kiel oni proksimume prononcas esperantlingve.

Samideano SEPPIK, la aŭtoro de artikolo aperinta en

"HDE", skribas rilate al "Skrubmaniero de personaj kaj urbaj nomoj": Ne malpli danĝera estas la tendenco skribi proprajn nomojn de la latinalfabetaj lingvoj ne en ilia aŭtentika formo, sed laŭ prononco. Oni motivigas tion per la argumento, ke oni ne povas legi kaj prononci ne nur anglajn kaj francajn, sed ankaŭ germanajn, polajn, ĉeĥajn, skandinavaĵojn, italajn nomojn. Nu, en la naciaj lingvoj ekzistas multe da fonemoj (sonoĵ), kiuj per la ordinara alfabeto de aliaj lingvoj ne estas transigeblaj (tradikeblaj) kaj por alilingvanoj ofte neprononceblaj. La transkribo povus esti nur tre proksimuma, eĉ erariga, kaj sonus tre strange, tordite malfacile komprenebla. Ni ne faru al ni la iluzion, ke lerninte Esperanton ni samtempe lernis ankaŭ la komplikitan ortografion kaj prononcadon de ĉiuj naciaj lingvoj!

En alia loko li citas: "Eĉ Volapük konservis la originajn formojn de propraj nomoj". Des pli devus fari tion Esperanto, kiu ne estas la sekreta lingvo de iu fermita sekto, sed (volas) celas fariĝi interkomprenilo inter la popoloj. Sekve ni ĉesigu la ekscesan esperantigadon kaj asimiladon laŭ proksimuma pro-

nonco de propraj nomoj. Ankaŭ ĉe la geografiaj nomoj ni sekvu la praktikan internacian kutimon asimili nur la plej konatajn, plej uzatajn aŭ tradiciajn: Ekz. Hinda Oceano, Balta Maro, Antiloj, Nov-Zelando, Danubo, Bruselo, Varsovio ktp. Ili estas multaj kaj ne devus troviĝi en ĉiu Esperanta Vortaro. Sed kiam geografiaj nomoj estas oportune asimileblaj kaj kripligās ĉe esperantigo, ni uzu ilin en ilia origina aŭ plej internacia formo.

Vere, la bildo de la propraj nomoj, kaj personaj kaj geografiaj, estas tre multekolora. Kaj multekolora ĝi estas pro la komplika kaj tre varia ortografio de la naciaj lingvoj. Ne ni, adeptoj de internacia lingvo, estas kulpaj en (pri) tio, kaj ne nia tasko estas reformi kaj unuecigi ilian ortografion".

Ĉi-loke mi atentigas pri la poŝtatlaso aperinta antaŭ kelkaj jaroj en Ĉeĥoslovakio; en tiu ĉi libro (maparo) vi povas legi la esperantigitajn nomojn de ĉiuj landoj tutmondaj.

Same mi atentigas pri la verkaĵo nome "Detala Grammatiko de Esperanto" de Hermann Göhl. Ankaŭ li interpretas sian opinion pri tiu problemo kaj faras siajn

proponojn. Rilate la aplika-
don de la sufiksoj "-uj-" kaj
"-i-" ĉe landaj nomoj, la
Akademio intertempe nuligis
la antaŭan malkonsilon de la
Lingva Komitato uzi la sufik-
son "-i-", sed ne ŝanĝante ĝin
al rekomendo, lasas al la
ĝenerala uzado libere decidi
pri la venko de la pli interna-
cia formo.

Kiel jam dirite, mi
atentigas pri la poŝtlataso
tutmonda. Inter la landaj
nomoj vi ne trovas landan
nomon kun la sufikso "-uj-".
Kaj tion mi ankaŭ subtenas.

La lingvamiko SEPPIK
plue rekomendas, ke oni
kompilu kaj eldonu libreton
(manlibreton), kie estu ma-
llonge klarigata la elparolo
(prononco) de propraj nomoj
en ĉiuj latinalfabetaj lingvoj.

Kaj jen la alia ombra
flanko: "Lingvo-amiko SEP-
PIK" prezentis sian opinion
formulitan per la okuloj de
homo, kiu rigardas (konside-
ras) ĉefe Eŭropon, preteraten-
tante grandajn partojn de la
mondo.

S-ro "Akiko ŬSINK-
NAGATA" (ankaŭ en tiu ĉi
kazo mi ne scias prononci
precize lian nomon) skribas
en alia artikolo aperinta
ankaŭ en "HDE": Konside-
rante, ke mi renkontis en
Eŭropo multon da personoj,
kiuj havas la saman opinion
kiel S-ro SEPPIK, mi pretas
nun reagi por prezenti nur
malmultajn ekzemplojn el la
vasta Azio, kie grandparte
oni ne uzas la latinan alfab-
eton en sia nacia lingvo, same

kiel la araboj, bulgaroj,
grekoj, rusoj kaj aliaj.

Karaj lingvamikoj, mi
volus mencii nur du ekzem-
plojn pri la prononcado en la
ĉina lingvo, ĝi havas kvar
diversajn tonojn, tio estas,
fonemoj por silaboj. La nomo
-Ma- en la ĉina lingvo povas
signifi unue -patrino, due
ĉevalon, trie -ĉu (en germana
lingvo -ob)ktp. Do vi scias,
ke nura tonnuanco signifas
alian vorton. S-ro Gou kun
tiu tono kaj S-ro Ĝou kun alia
tono estas malsamaj nomoj
laŭ la ĉina kriterio (german-
lingve -Unterscheidungsmerkmal,
Kennzeichen). Pro tio la ĉina lingvo
havas gravan handikapecon
(malavantaĝecon). Verŝajne la
saman handikapecon havas la
vjetnama lingvo kaj kelko da
aliaj.

Ankaŭ Zamenhof espe-
rantigis ne malmulton da
propraj nomoj, sed ankaŭ ne
riskis esperantigi ĉiujn no-
mojn.

S-ro SEPPIK skribis:
"Ni ne faru al ni la iluzion,
ke lerninte Esperanton ni
samtempe lernis ankaŭ kom-
plikitan ortografion kaj pro-
nuncadon de ĉiuj naciaj ling-
voj!".

Samlingvano "Akiko
ŬSINK-NAGATA" daŭ-
rigas en sia artikolo: "Sufiĉu
unu sola internacia lingvo por
la internacia komunikado de
la ordinaraj homoj sen specia-
laj lingvaj talentoj. Ni ne
hontu, ke ni konas (scipovas)
la internacian lingvon krom
propra nacia lingvo kaj ne

konas (scias) kiel prononci
proprajn nomojn skribitajn
laŭ alinaciaj ortografioj, ĉar
finfine tio lasta ne kondukas
al la kompleta kapablo preci-
ze prononci laŭ la ortografioj
de miloj da naciaj kaj gentaj
lingvoj.

Antaŭ ĉirkaŭ 80 jaroj
aperis 91-paĝa dokumento de
la Lingva Komitato pri la
transkribo de la propraj no-
moj, en kiu troviĝas ankaŭ
samaj opinioj kiel hodiaŭ.
Verŝajne ne eblas fari ian
regulon pri tiu jam delonge
pendanta temo en la nuna
tempo, t.e. transira epoko.
Sed mi persone daŭrigas S-
ro ŬSINK-NAGATA- ĉiam
bonvenigas la -nur per la
kono de Esperanto- prononce-
blajn transkribojn kaj dankas
la transkribintojn pro ilia
kompreno al la nacioj, kiuj
havas nelatinajn alfabetojn kaj
ideografiaĵojn (germane:
Begriffsschriftzeichen, Id-
eenschriftzeichen).

Mi persone procedas
jene: Kiam mi forsendas bild-
karton kun teksto ekz. "Fich-
telberg", tiam mi skribas
klarigante: monto Fichtelberg
(legu: fiĥtelberg-Fichtelberg
estas la plej alta monto de la
iama GDR) ktp., plue estas
rekomendinde ĉe urbaj kaj
vilaĝaj nomoj aldone skribi
vortojn "urbo Aue, urbo
Scheibenberg, vilaĝo Blume-
nau ktp., se temas pri distrik-
ta urbo mi skribas: distrikta
urbo Dresden aŭ Dresdeno,
kaj eble en krampo la pron-
oncon proksimuman. Ĉe
nomoj kiel "Schwarzenberg"

oni eble povus, mi dirasurbo "eble" skribi: Nigra Monto, sed karaj lingvo-amikoj, kiamaniere oni transskribu la nomojn "Elterlein, Crimmitschau, Kretschamrotensehma, Öderan, Lüneburg ktp.? Do el tio vi povas vidi, ekkoni ke tiu ĉi problemo, konsiderata mondscale, estas problemo malfacilega kaj neefektivigebla.

Nun mi venas al la fino de miaj disvolvoj pri la problemo: "Skribmaniero de propraj (do personaj) kaj urbaj nomoj.

Mi esperas, ke mi trovis orelojn por miaj disvolvoj kaj klarigoj.

Magnus Weisflog

Recenza Angulo

Aspektismaj Reguloj pri la Verbaj Formoj en Esperanto

Propra Eldono de Olav Reiersøl.-
Nøtterøy.

Ĉar la Participa temo estas jam tiel kaj tiom draŝita, mi nur hezitante konsentis recenzi tiun ĉi kajeron.

Ne fordormu la okazon! Don Quijote + HEF-kotizo 1992

NUR 5.000 PTOJN

Pagojn sendu al Libroservo de HEF ĝis 31-12-91
Notu ke la tuto kostos 6.000 ptojn ekde 1-1-92

Kiam antaŭ dudek kvar jaroj mi recenzis similan de T. Jung, mi difinis mian pozicion akordan kun la posta Akademia Decido en 1968a, per kiu finiĝis tiu ne ĉiam sincera debato. Mi diris ne sincera, ĉar tiam por defendi AT-ismon oni argumentis per frazoj similaj al tiu ĉi: "Li instruis en lernejo, el kiu li estis elpelita", kaj demandis por kontrasto: Kiel li povis instrui tie, se li estis elpelita? Tiel oni pretendis pruvi, ke la ĝusta formo estas ... "el kiu li estis elpelata".

Nu, oni imagu instruiston, kiu instruas forpelate! (=ago tiam prezenca). Serioze; mankis la tempindikilo: ... "el kiu, li (iam antaŭe) aŭ (poste) estis elpelita".

Certe, ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu, ankaŭ ne la Akademiaj Decidoj; sed sen lingva disciplino, nia tutviva penado por Esperanto fariĝos ruino.

La t.n. AT-ismojn la aŭtoro defendas ne per teoriaj konsideroj, gramatiko k.s., sed per kontraŭmeto de nombraj -laŭ lia kompreno- reciproke malkongruaj difinoj de reguloj kaj vortoj (ĉu de daŭro, rezulto k.a.) faritaj de niaj ĉefaj esperantologoj. Tio rezultigis 75 paĝojn da paragrafoj per kies kontrasto la aŭtoro konkludas ke la Zamenhofa uzado estas akorda kun AT-ismo, kontraŭ kiu tamen decidis la Akademio, tute prave, laŭ mia opinio. Ekster ĉia nacilingva verba konsidero, la prezenco ne ekzistas sen daŭro. Tial, atribui al ATA, (prezenco ago) signifon de finiteco, estas mallogike, ĉar kio jam finiĝis (=ITA), tio ne plu

estas prezenca, kaj kio estas prezenca (ATA), tio ankoraŭ daŭras.

La participoj estas esence adjektivaj kaj rolas sufikse same kiel EBLA kaj INDA: Letero skribata (komencita kaj ne finita); Skribita (finita); Skribota (ne komencita); Skribebla (kiu oni povas skribi); Skribinda (kiu meritas skribon). Tiu ĉi difino validas en la tri tempoj (as-is-os) kaj ĝi havas nenion komunan kun la nacilingvaj verbtabeloj.

Ŝajnas, ke la aŭtoro (pĝ.68) pli preferas apliki certajn regulojn ol sekvi la rekomendon de Zamenhof, ke "Oni lernu la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito el liaj libroj".

Salvador Gumà.

* 40-jara instruistino pri historio dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adreso: S-ino. Vasilla Ivanova Malinova; str. Poltava, 7. ap. 15-500-VELIKO-TARNOVO. Bulgario.

* 13-jara knabino dez. kor. kun hispanaj knabinoj pri div. temoj kaj interesanĝi bildkartojn kaj glumarkojn. Adreso: Gsantos Natalia; Szirmabesenyó, Gárdonyi G. u.1. 3711-Hungario.

* Latva kolektanto de bildkartoj kaj poŝtmarkoj dez.kor. kun hispanoj. Adreso: Alfred Ge Germanis Ciemupe. Str. Mednieku, 2 228320 KEGUMS. LATVIO.

* Hungarino dez. kor. pri Fremdultrafiko kaj Esperanto

deziras

korrespondi

sub ĉiuj aspektoj. Adreso: Dobos Erzsébet. Budapest. Rodosto u.6 I/A. 2/5. 1118-Hungario.

* 58-jara pensiulino dez. kor. kun hispanoj pri ĉiuj temoj. Adreso: Nevena Peeva, 5000-VELIKO-TARNOVO. Str. Kozloduj, 6. ap. 11. Bulgario.

* Zairano, Komencanta esperantisto, dez. kor. kun kristanoj per mesaĝo de William Marrion Branham. Adreso: Lendo-Phabu, Asemblée de Boma-Boma. Bas Zaire. ZAIRE.

* 17-jara gimnazia hungaro dez. kor. pri futbalo, literaturo, elektroteknikon, moroj, ktp. kun knaboj similaĝaj. Adreso: Lászlo Benko; Kecskemet-Hetényegyháza; vezer u. 21-6044. Hungario.

* 13-jara knabino dez.kor. pri ĉiuj temoj. Adreso: Nevema Hitova; 5000-VELIKO-TARNOVO; Str. Kozloduj, 6. ap.11. Bulgario.

* Reprezentanto de "Librotur" en Lublin serĉas kontaktojn kun esperantistoj kaj Turismaj Agentejoj el Hispanio por priturismaj celoj. Interesatoj bonv. skribi al: Vicdirektorino de Biuro Turystyki Esperanciekje "LIBROTUR"; ul. Krak.-Przedmiescie 59/7. 20-076 LUBLIN. Pollando.



Elvokante nian Lirikan Feston

Kiel promesite, ni komencas hodiaŭ publikigi en nia revuo tiujn poemojn deklamitajn en la 1a Lirika Festo de HEF, pri kiuj pro mankospaco ni nur aperigis kelkajn versojn en la kroniko pri la kongreso de La Laguna.

En tiu ĉi numero de "Boletín", ni publikigas tutan poemon de Gabriel Mora i Arana, elstara poeto en la kataluna kaj esperanta, kiun li speciale verkis honore al Prof. Régulo Pérez:

Kiel tute alia deĉifrado de la Rosetta Ŝtono.-

Mi ne pretendas la klerecon de Champollion senprestiĝigi,
ĉar fidas mi je li pri ĉio kion, senmezure, mi ne scias.
Mi, tamen, plenkonjekte, al mi mem respondojn donas
kiuj devenas de la miaj persistentaj kaj iamaj emocioj
ne fremdaj, ja, al tiuj ensorbitaj dum la observado
de l' nokta firmamento en medio rura:
revante tra la vasta turnirej' mitologia.
Tial, laŭ graco de l' intuicio, konvinkiĝis mi
ke poezi' devas sin turni al estonto, krei
por la morgaŭo: ne, do, laŭ altir' de l' glor' pasinta.
Tamen, la plumo, epigone, ja nerekte nek profunde, plugas
stirate per la mano el la cerbo-koro, nurajn iluziojn.
Ha, mi revenas al la paradiz' perdita
kaj mitigita, de l' ĉagrenoj infanaĝaj
ne tute forsvenitaj, malgraŭ ĉio: jes, de kiam
mi larmadis
en la lernej', starante antaŭ piloria
mura nigra tabul', pro nekapablo multipliki
ĝuste-rapide laŭ faktoroj multciferaj.
Rememorante tion hontas mi, ankoraŭ,
pro l' kunlernantaj ridoŝercoj senkompataj.
Sed, kiu bub' el tiu aro moka, tiam estus imaginta
ke mi, en la estonto la Rosetta-ŝtonon
(kiu spekulativi scias pri l' nekonateco?)

aliel mi deĉifrus? Eĉ mi mem
ne povas tion kredi. Sed deziras mi restadi
kiel gapul', jaron post jar', amanto de la pluvo,
antaŭ l' evidentec' de la printempoj kaj aŭtunoj,
kaj l' amasiĝ' da rememoroj kiuj identigas
en sfinksospronon kiu pruntas, al responso nure mia,
la vortojn de l' enigmoj -aŭ la duboj- krude
eldiritaj.

Se same ver' ne eblas ke troviĝu
en samtempeco, ĝi, kun pluraj faktoj ja antagonismaj,
nur en la homa bonvolemo fajr' kaj akvo, tamen,
kapablas kunfratiĝi spite la naturajn leĝojn
samkiel gea amo en, kaj fremde,
de l' teori' de la relativeco.

Pri la trovita ŝton' bazalta kaj trilingva kaj
trialfabeta
alian sencon, el la enhaviĝinta vero, estas deduk-
tinta mi,
ne mediume, sed nur introspekte, kvazaŭ estus mi
ĝin priĉizinta.

Sed, kiel ĉion ĉi malsekretigi?
Nur poezie mi kapablas tion fari por min tenti
dum historio nur la faton trudas kiam,
vole-nevole, profitele, kredigita estas ĝi.
La amo, tamen, estas ne privilegio:
sed rajt' kaj devo, kiel tiu de la riverfluoj
kiuj meandras tranĉe tra ravinoj de l' jarmiloj.
Ĉu vi divenis, do, ke mi amadas?
Ĉu, nun, vi gvate eksurprizis min en la klasĉambro
tiama, kvazaŭ tie mi ankoraŭ staru antaŭ tiu murtabulo?
Ĉu tie vi min vidas ke perkrete, febre, mi skribadas
laŭ vertikalaj vicoj, tamen ne punite,
milfoje, saman virinnomon? (Ho, persista avataro!)

En ŝi la sango mia lirle similadis al rivero Gvadiano
kiu subenteriĝas, dum fluad', por reaperi
pli june, vivoplene, brilarĝente;
por, poste, cele impetadi al senmezureblo
de l' mar' fekunda
la maro urĝiganta al ĉiel' la povon
redoni nutre al la montoj, por iliaj fontoj virgodonaj,

la daŭran, pluan, ŝpruckapablon por riverorgojlo virta.
 Restadis naŭmonate mia sango en tepida nokto
 de la stratumoj plej intimaj de virino.
 Kaj kiam gvadiane ĝi eliris, karna naskiĝploro
 kvazaŭ kaskad' iriza je futuro esperriĉa,
 movigis ŝake ĉiujn zodiakajn stelojn.

Kaj en la fundo de revad' pasie homa
 signifklarigas mi, laŭ elementaj puzlaj vortoj
 misordigitaj, la Rosetta-ŝtonon:
 tiun de mia viv' en senrimeda nesciado
 laŭ kle' de am' kaj poezi' delikta.

Gabriel Mora i Arana.

La direktoro de la Festo, samideano Miguel Fernández, prijuĝis ĉi-belan poemon per ĉi tiuj trafaj esprimoj: "Longaj serioj da majstre ĉizitaj jamboj. Ritmo. Konstanta ritmo, ne nur rilate la metrikon mem, sed ankaŭ rilate la ideojn. Poezio kiel introspekta rimedo por memkonado. Serĉado de la perdita tempo. Hermetismo mildigita de palpebla emocio...Jen la karakterizaj trajtoj de la deklamita poemo".

Vere, ne multe oni povas aldoni al tiuj precizaj kaj trafaj prijuĝoj.

La Redakcio.



★ 13a Hispana-Franca Renkontiĝo.-

Organizite de la Esperanta Centro "FRATECO" de Zaragozo, okazis la 7an kaj 8an de Septembro en la monaĥejo de Iranzu en Estella (Navaro) la 13a Hispana-Franca Renkontiĝo.

Partoprenis ĝin preskaŭ kvindek geesperantistoj de Pau (Francio), Bilbao, Logroño, Pamplono kaj Zaragozo.

La distra programo, sen rigidaj formuloj, malvolviĝis en agrabla amikeca etoso en tiu vizitinda monaĥejo, kie tute ne mankas trankvilo kaj bona manĝo. Laŭprograme, oni vizitis la

urbon Estella, prelegetis Lorenzo Noguero, majstre kaj belege ludis gitaron samideano el Bilbao kun akompano de improvizitaj kantantoj, paroladis Robert Lloancy amuze kaj distre pri mil kaj unu anekdotoj de nia esperantista mondo, kaj fine, la eminenta verkistino Encarnación Ferré deklamis en Esperanto poemojn de Lorca kaj aliaj grandaj poetoj, kiujn aklame kaj unuanime aplaŭdis la ĉeestantaro.

Resume, tre, tre agrabla ripetinda Renkontiĝo, kiu, plian fojon, unuigas

Grava anonco pri la Merida Kongreso

Tial ke al Mérida jam alfluas hotelaj rezervopetoj por EXPO-92, estas necese antaŭmendi jam rezervon. Do, ĉiu ebla partoprenonto aliĝu tuj por ricevi de la kongresa respondeculo, Francisco Cabezas, la necesajn informojn, kaj eviti ajnan loĝ-problemon. HEF tute ne respondos pri mankoj tiurilate ĉe malfraj aliĝintoj.

en frata etoso geesperantistojn de ambaŭ flankoj de la belegaj Pireneoj.
Miguel Ángel.

★ Venonta SAT-Kongreso.-

La 65a Kongreso de SAT okazos en Litovia Agrikultura Akademio de Kaunas (Litovio) de la 5a/8/ ĝis la 15a/8/1992a. Pliajn informojn en: SAT, 67, Av. Gambetta. F-75020 PARIS. (Francio)

★ 31aj Internaciaj Floraj Ludoj.-

Unu plian fojon okazis, ĉi-jare en Tarragona, la unika ceremonio per kiu oni omaĝas la gajnintojn de la jam vere tradiciaj *Internaciaj Floraj Ludoj*. La sekretario de la Ludoj, S-ro Joan Ramón Guiñón, legis la verdikton, kiu kaŭzis veran surprizon ĉe la ĉeestantoj: juna portugala poeto, Gonçalo Neves, akaparis ĉi-jare la premiojn. Ilin oni povos legi premiere en *Kataluna Esperantisto* kaj *Literatura Foiro*.

Prelegis la elstara skota poeto S-ro William Auld, kies edzino fariĝis la reĝino de la festo, laŭ la deziro de la laŭreato.

★ 13a Brazila Esperantista Junulara Kongreso.-

Tiu Kongreso okazos en Barra do Garcas (Brazilo), ĉe paradiza loko, de la 19a ĝis la 26a de Januaro 1992, sub aŭspicio de la urbodomoj de Barra do Garcas, Aragarcas kaj Torixoreu. Artaj Vesperoj. Interesaj ekskursoj. Altnivela Folkloro. Informoj: Amarilio Carvalho. Caixa Postal 1107; Br.20001-Rio de Janeiro. RJ. Brasil.

★ Dua Afrika Kongreso de Esperanto.-

De la 27a de Decembro 1991 ĝis la 2a de Januaro 1992 okazos en Benino la indikita Kongreso. Konstanta adreso: UEA-Afrika Agado; p/a. H. Bakker. Kastelenstraat 231; 1082 EG. Amsterdam. Nederlando.

★ KEA-Kongreso.-

Okazis en Tarragona de la 1a ĝis la 3a de novembro la 25-a Kongreso de *Kataluna Esperanto-Asocio*. La Kongresa temo estis "Esperanto kaj turismo". Kadre de la ĉi-jara aranĝo, la Asocio faris sian Asembleon, kaj prezentis siajn eldonaĵojn. Solo amuzis la partoprenantojn de la arta vespero, oni ekskursis al la Monaĥejo de Poblet, kaj okazis la kutime brila prezento de la *Internaciaj Floraj Ludoj*.

★ **Estrar-kunveno de HEF en Madrido.-**

Profitante inviton de la Ministerio por Edukado al s-ro Prezidanto Alonso Nuñez, parto de la HEF-estraro, kune kun s-ro Francisco Cabezas, kunvenis en Madrido la 8an kaj 9an de novembro por pritrakti ĉefe la venontan kongreson en Mérida.

La kongreso okazos de la 30a de aprilo ĝis la 3a de majo de 1992. La plej granda parto de la "interna" laboro okazos la sabaton (jar-raporto, financoj, debato pri organizado, prelaboro de UK, ktp.)

La dua Lirika Festo alportos tre pozitivan surprizon: la profesi-nivelan koruson Verda Stelo. Kadre de la ASKH s-ro Serrano prelegos pri "Legado de la verko Don Kihoto laŭ

alitipa vidpunkto", kaj okazos provlecioj pri la Preuniversitataj Kursoj, surbaze de specifaj studkajeroj.

Ekster la prikongresaj temoj oni decidis eldoni flugfolion taŭgan por varbilo-aligilo, kaj periodan informilon en la hispana.

★ **Unua Esperantista Rendevuo, en Moia.-**

Kunvokitaj de pluraj esperantogrupoj de Katalunio, la 29an de septembro pli ol 140 e-istoj renkontiĝis en Moia por omaĝi la forpasintan s-ron Ramón Molera.

Strato kun lia nomo estis inaŭgurita kaj oni prezentis la libron *Zamenhof, doctor Esperanto*, teatraĵo verkita de s-ro Camprubí.

uea venis al Valencio

De la 6-a ĝis la 11-a de novembro vizitis Valencion la Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de uea, s-ro Simo Milojević, kaj la Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro Nikola Rašić

Kune kun la LKK ili vizitis la valencianj aŭtoritatulojn kaj la plej gravajn lokojn rilate al la UK, t.e. Palacon de la Muziko (kongresejo), la Internacian Foirejon, lernejojn por la Infana Kongreseto, hotelojn kaj restoraciojn. Cetere ili kunvenis kun reprezentantoj de vojaĝ-agentoj, ktp.

Plej grava estis la kunveno kun la urbestro de Valencio, Rita Barberá, kiu montris sian plenan apogon al la Universala Kongreso.

La tutan sabaton la komisiono laboris kaj diskutis pri diversaj temoj rilate al la UK, en la Grupo Esperanto de Valencia. Ĉeestis la tuta LKK, pluraj membroj de la asocio kaj samideanoj alvenintaj de Alicante kaj Barcelona (ĉi lastaj por paroli pri la antaŭkongreso).

La komisiono gratulis la LKK-n pro ĝia ĝisnuna bona funkciado, kaj rimarkigis la fakton, ke oni bezonas la helpon de la samideanaro de la tuta Hispanio por plenumi la farendan taskon.

Augusto Casquero

Poetoj de Al-Andalus.


LA ERUDICIA IBN HAZM.

Abū Muhammad Ali ibn Hazm, plej granda verkisto de sia epoko kaj eksterordinara poeto naskiĝis en Kordovo en la jaro 933a.



Eleganta junulo apartenanta al la rafinita Kordovo umaja en ĝia lasta periodo, jam junaĝe li komencis intrigi en politikaj aferoj, kiuj oftigis la intercivitajn militojn ĝis la falo de la Kalifejo. Inteligenta kaj kuraĝa li intervenas en ĉiuj konfliktoj, ŝanĝas sian religion kontraŭ alia pli rigora, defendas proprajn konceptojn jurajn, filozofiajn kaj teologiajn, ekziliĝas, vagas de unu loko al la alia kaj montriĝas kiel intelektulo de profundaj konvinkoj. Oni povas diri ke li estas fidela ekzemplo de tiu senstabla socio ribelema kaj kun propra personeco, kiu ne plu scias obei... kaj dume, li verkas kaj verkas montrante sian erudicion senegalan.

Aŭtoro de scienca verko "Historio de la religioj, sektoj kaj skoloj", kvinvoluma, tradukita al la hispana de M. Asín Palacios (1927-1932), majstra verko ne superita en tiu fako ĝis la 19a j.c.. Aŭtoro ankaŭ de "Epistolo laŭdanta Hispanion", "Brodaĵo de fianĉino", "Religia polemiko kun la juda-hispana Sĉmuel ibn Nagrella", psikologia studo "La karakteroj kaj la kondutoj", kaj elstara sub vidpunkto beletra kaj kun valoraj pensoj "Konfesoj". Ankaŭ pri poezio li estas vera zenitulo. Post la falo de la Kordova Kalifejo la reĝo Mutamid de Seviljo ordonis bruligi liajn librojn pro religiaj motivoj.



Specialan komenton meritas lia verko "La kolombkoliero" aŭ "Libro pri la Amo", tradukita al la hispana de E. García Gómez (1967), libro verkita en prozo kaj verso, kiu analizas la fenomenon AMO sub la plej diversaj aspektoj: psikologie, etike, intelekto, religie, sekse, familie, ktp. Dum jarcentoj oni ne konis traktaĵon pli kompletan kaj trafan pri la indikita temo. La poemoj kiuj en ĝi aperas esprimas per delikataj trajtoj la nuancojn plej fidelajn pri la karaktero de la amo, kiun li priskribas, foje pri la sekspasia, foje pri la senco etika, aŭ lirika, religia, intelekta, ktp. La poemojn verkitajn sub la versformo de la araba kasido mi nun tradukas al Esperanto envolvitajn en la versformo romano, la plej antikva de la hispana Poetiko. Jen peco de unu el tiuj cititaj poemoj de la verko "La kolombkoliero":

Stelpaŝtisto mi ja estas,
ĉar mi sentas la obsedon
paŝti en la noktonigro
brilajn stelojn kaj planedojn.

Nokte, l'astroj dum jarmiloj,
ŝajnis en mi, kor' kaj menso,
fajroamajn incendiojn
lumigantajn la tenebron.

Estis, kvazaŭ mi, gardisto,
devus zorgi ĉi ĝardenon
de obskuraj-verdaj grizoj,
kies altaj riĉaj herboj
brodas multajn bel-narcisojn,
miro eĉ de Ptolomeo,
la plej dokta esploristo
pri rigardesplor' de steloj.

Nur l' okuloj miaj haltas
sur vin, ĉar vi, sorĉmagneto,
min altiras kaj log-gvatas
viaj iroj kaj revenoj.

Kiam mi tuj vin forlasas
sentas mi la mortsuferojn
homan de la hor' fatala,
kaj kun tia lanta spleno,
kiel fiksjaj steloj marŝas
sur la granda firmamento.

Kaj jen, kiam tute plaĉa
mi aliras vian serĉon,
kiel lum' mi kure hastas
tra la vastaj blu-ĉieloj...
kaj se aŭdas vian voĉon,
iras mi al vi kaj flaras
l' ambraromon el korpo,
kiun mi freneze amas!

Kaj aŭskultas mi nek vorton,
se ne estas via ĉarma
kaj belsonan paroldolĉon;
Princ' mem de Kredantoj vanas
por ŝanĝigi mian volon
pri inklino tiel rava!



Tiu ĉi poeto, apenaŭ konata nun de fakuloj, verkis tiujn belegajn versojn pli ol unu jarcenton antaŭ la poemo "Kanto de Mia Cid" (1099), kaj konsiderinde antaŭ la periodo plej aktiva de la trubaduroj (XIIa-XIIIa j.c.), tamen lia verko estis tradukita al okcidentaj lingvoj nur antaŭ kelkaj jaroj.

La poezio de tiu ĉi epoko, same kiel la civilizacio hispana-araba (mirinda neeksplikebla simbiozo) estas kiel skribas Lévi-Provencal, "feliĉa kombino de alportoj de orienta klasikismo kaj de elementoj prenitaj el la lando de tiuj, kiuj depostulis sian kulturon el paseo kaj la propran tradicion antaŭajn je la islama regado". Sed de tiu ekkombino, grava simbiozo transformis la naskiĝintan novan poezion de Al-Andalus iam rigardanta al Damasko kaj Bagdado, por alia tute sendependa dorsen al Oriento plene fidanta je siaj propraj valoroj. Pri tiu fenomeno García Gómez skribas: "mi kvalifikas la kordovan poezian skolon, kies plej elstaraj reprezentantoj estas Ibn Suhayd kaj Ibn Hazm, kiel naciisman skolon, ĉar, malgraŭ ĝia origino, ĝi celis malproksimiĝi de la orientaj modeloj kaj aspiris munti sian destinon en la temperamento kaj propraj valoroj de la poetoj mem, eble pro filtrado de la okcidenta spirito". Kaj la eminenta verkisto H.Péres konfirmas: "la hispano-arabo vivanta dum la XIa j.c. sin prezentas en la tiuepoka poezio kiel kurioza

miksaĵo de persono antikva kaj moderna, klasika kaj romantika, voluptama kaj mistika kaj eĉ kiel pagana kaj kristana samtempe".

Ibn Hazm sin sentis en tiu Al-Andalus sur la propra tero; Mez-Oriento signifis por li nenion specialan: nek la patrujo de liaj antaŭuloj, nek la modelo de lia poezio, eĉ ne la lingvo, ĉar ekster la palacoj kaj oficialaj medioj li parolis la romidan lingvon kaj verkis en la araba same kiel en la romida... Kiam li konstatas sian nefremdecon, ie li skribas: "malproksima de mi, ho perlo de Ĉinio, sed sufiĉas al mi posedanta la rubenon Hispanio". Kaj pri la sendependeco de lia poezio rilate la araban, oni povas legi je la fino de la prologo al sia verko "La kolombkoliero" jenan frazon dediĉitan al amiko: "Senkulpigu min, amiko, ke mi ne prezentas al vi rakontojn de beduenoj aŭ historiojn de antikvuloj, ĉar iliaj vojoj alkondukas al destinoj tute malsamaj je la niaj"...

Ibn Hazm forpasis en la jaro 1064a, en Casa Montija, provinco Huelva.

Antonio Marco Botella

★ ESPERANTISTA BEBO EN PORTUGALIO

Kiam naskiĝis Joĉjo, karesnomo de Johano Perejro Santo, (1) la patro, mi, jam tiam engaĝita ĝisorele en la portugala esperanta movado, ne povis ne ekparoli nur en Esperanto al la ĵus-naskiĝinto. Legante ĉiam tre atente la cirkuleron por esperantlingvaj paroj kaj familioj estrata de gesinjoroj Renato Corsetti kaj Anna Lowenstein, mi lernis el la spertoj de aliaj gepatroj. Tiu cirkulero fariĝis mia lernolibro en la arto eduki filon en Esperanto. Kortuŝaj patrin-rakontoj, porinfanaj kantoj, pedagogiaj eseoj, adresaro, ĉio ĉi kaj multe pli viciĝas tra la paĝoj vinktitaj de la cirkulero. Meritus sendube la revuo apogon de la esperanto-movado por egaligi la grafikan kvaliton al la jam bona enhava kvalito instrue sukoplana.

De la patrino, familianoj, vartistinoj, amikoj, najbaroj, ktp., la infano ricevas la portugalan. Al Portugala Esperanto-Asocio malofte mi kunportis Joĉjon, ĉar alie anstataŭ instrui Esperanton, mi devus manĝigi lin, trinki al li la lakton, pugpurigi, vindi...nu...patra vivo. Do, nur mi parolas esperante al Joĉjo, sed ĉiam, nepre, senescepte. Tiel la kontakto kun Esperanto estas multe pli eta ol tiu kun la portugala. Joĉjo pasigas la tutan tagon en vartejo, kaj vespere kun la patrino kaj aliaj familianoj. Kun la patro li rilatas jen tritage semajne, jen en tuta sinsekva semajno, jen tute ne en unu semajno.

Nun Joĉjo estas trijaraĝa. Bebe li parolas la portugalan, kaj ĝin komprenas perfekte. Esperanton li komprenas tre bone, sed malmultajn vortojn li eldiras en



Esperanto: mono, loko, kaj kaŝ-kaŝ estas la plej bone asimilitaj.

Kiam mi irigas lin rajdi La abelon majan, rajdludilo, kaj post kiam li grimpas kaj sidigas, li turniĝas al mi: —Momo, papá!(2)

Kiam li veturas kun mi aŭte, je la aŭtoeniro, mi diras al li: Joĉjo, iru al via loko!

Kaj foje li respondas ion similan (3) al ĉi tio: —Tef 'lokuf a 'kaRu a paj-(4)

En Portugalio, kaj certe aliloke, la infanoj lude kaŝigas malantaŭ io ajn kaj diras ion similan al ĉi tio: - Joĉjo (la propra nomo, parolante triapersono) ne estas ĉi tie...! -kaj iom poste- Ku...ku, papá! Joĉjo estas ĉi

tie...!

-Iom trenante la voĉeton kukole- Nu, kiam Joĉjo ekdiris al mi "Ku...ku!, mi respondadis al li "Kaŝ...kaŝ!, kaj poste mi diras: Joĉjo kasiĝas...!

En la sekvanta tago, kiam mi prenis la bebon de ĉe la patrino, kiu estis mia unuagrada lernantino kaj ankoraŭ bone komprenas Esperanton, Joĉjo ludadis kun ŝi tiun ludon, kaj ŝin korektis: "Ku...ku!" ne, panjo! "Kaŝ...kaŝ"!

Joĉjo emas korekti la adoltojn paroli. Ĉefe se la adolto estas la povra paĉjo, eble laŭ lia penso, la ununura persono kiu misparolas. Ofte, post kiam mi eldiras vorton, li korektas min. Ekzemple:

—Papá...awko 'kaRu 'gádo, pa 'pa!. Kaj mi en Esperanto respondas: -Jes, Joĉjo, la aŭtobuso estas tre granda!

Tuj li okulaperte, stringante min dum mi stiras, milde, ec pedagogi-miene, klarigas min en la esperjoĉja kion mi rekte esperantigas:

—Ne...ne, paĉjo...(awko 'kaRu)...(awko 'kaRu), paĉjo!

Kaj jen mi elturniĝas: -Joĉjo, la patrino diras "autocarro"(6), la paĉjo diras "autobuso".

Kaj li tuj: —Kaj Joĉjo (awko 'kaRu)!

La plej intimaj personoj al kutimiĝis al la fakto, ke Joĉjo estas dulingvano. Sed kiam mi iras al kafejo aŭ al ĝardeno, foje la afero estas iom ĝena. Iam en ĝardeno, mi promenis kun Joĉjo. Ni konversaciis, kaj mi rimarkis ke proksimume sesjara knabino observas nin atentege. Ŝia scivolemo jam preterpasis siajn limojn, ĉar ŝi alproksimiĝis kaj pafis per akutege voĉeto: -Ĉu li ne estas portugalo? Ĉu li ne parolas portugale?

Satigi adoltojn tiel demandantajn ne estas facile...respondi al sesjara kva-zaŭvirino ensoviĝema estas terure: —Jes, knabineto...li estas portugala...vi povas paroli kun li...li komprenas vin.

Sed ŝi ne kontentiĝis: —Kial vi parolas fremde al li? Tiu lingvo estas tiel stranga...!

Mi klopodis sensukcese klarigi al ŝi la motivojn de la dulingvismo. Ŝi ade kvazaŭ persekutis nin en la ĝardeno.

Multe pli rakontindas pri la esperantistiĝo de Joĉjo. Eble aliokaze.

Johano Santo.

- (1) El la portugala "João Pereira dos Santos"
- (2) "Momo" en la esperjoĉja lingvo estas "mono". "Papá" estas la portugala vorto "paĉjo". Sed lia "papá" ne estas guste la portugala (pa 'pá), ĉar li eldiras la unuan silabon malfermita, do (pa pá).
- (3) Pardonu, ke mi havas nur pasivan konon de la esperjoĉja!
- (4) (Tef) estas portugala "tres", esperante tri. ('lokuf) estas esperante "lokoj". Joĉjo diras ĝuste "loko", sed en la pluralo ŝanĝas la lastan (o) al (u), kaj aldonas la portugalan fonemon por la pluralo (s), do ('lokuf). Influo de la portugala, sendube rajtigita de Albault. (a) en la esperjoĉja ŝajnas enkonduki adjekton... ('kaRu) estas la ĝusta fonemaro por la portugala "carro", en la Lisbona dialekto aŭ normo. En Esperanto aŭto. (paj) estas la ĝusta fonemaro por la portugala "pai". Do, la frazo signifas: "Estas multaj lokoj en la aŭto de la patro", ĉar tri en la esperjoĉja signifas "multaj". Kia lerteco, kia ŝparemo! Ni lasu la Akademion al la ĝissesjaraj infanoj!
- (5) Tiu ĉi salato signifas: "Paĉjo, la aŭtobuso estas granda!"
- (6) Portugala vorto por "aŭtobuso".

HEF

anuncia su
Cuenta Buena

Válida para toda España.

Sin transferencias ni costos adicionales.

nº 14.011.966 de Caja Postal.

Llegar ingresar y marchar.

¡Utilízala!

Fundación Esperanto premiis la C.O.-n de HEF

La patronaro de Fundación Esperanto, kunveninta en sia sidejo de Zaragoza la 15-an de junio 1991-a, unanime decidis aljuĝi la premion "Inés Gastón" al la Centra Oficejo de HEF en Madrido por rekompenci ĝian agadon dum la lasta jaro, kaj stimuli la daŭran disvolviĝon de ĝia modernigo.

Enrique Piquero, sekretario

Depósito legal: Z-334-90
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas